
# HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

**Nro. 88 - 1974**

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5

**Sabadellaj HEJS-anoj esperantigas la kavernajn vespertojn.**

# E N H A V O


Notoj.................................1
Inkubsonĝo sen fino.............2-3-4-5
Ben Suc...............................5
Pasporta -Servo.....................6-7
Ĉu vero aŭ blufo?.....................7
Novaj energiaj rimedoj..............8-9
En la profundaĵoj de la tero......10-11
VIª Franca-Hispana E-Renkontiĝo......12


Esperantaj kunvenoj:

----XXXIVª Hispana Kongreso de Esperanto: Ĝi okazos en Valladolido de la 18ª ĝis la 22ª ink. de Julio. Venu renkonti viajn samlandajn amikojn. HEJS-tago estos la 18ª. Informoj kaj aliĝoj ĉe:

Str. Dos de Mayo, 4

VALLADOLID-

----Migrado en Svisa Alparo. Por ekzerci la krurojn kaj esperantumi estas organizita tiu-ĉi migrado. Kotizo inkludante ĉion inter 150-200 sF. Ĝi okazos de la 17ª ĝis la 22ª de Julio. Informoj kaj aliĝoj ĉe:

Somera Migrado / Daniel R. Mühlemann

Museumstr. 19

CH-5200 BRUGG / Svislando

DEZIRAS KORESPONDI:

JANUSZ- JAKULO KWAPIEŃ , 17ª pola studento. Li interesiĝas pri muziko, sporto kaj popolarto kaj kolektas murkalendarojn, esperantaĵojn, k.t.p. Deziras korespondi pri ĉiuj temoj: Adreso :

20041 LUBLIN

ul. TOPACIŃSKIEGO 5/24 POLLANDO

# INKUBSONĜO SEN FINO

Aleksandro Krimgold estis rusa judo kiu akompanis edzinon de malliberulo viziti sian edzon en la malliberejo. Dum la vojo tra la arbaroj de la mordavia regiono, Krimgold vidis en maldensejoj (senarbigitaj partoj en la arbaroj) malbelajn enfermaĵojn, unu post la alia, ĉirkaŭitaj de pikdrato. Feroc-aspektaj gard-hundoj. Gardturoj kaj armitaj gardistoj.

Krimgold jam sciis pri tiuj labor-kampoj, same kiel milionoj da aliaj civitanoj en Sovetunio hodiaŭ. Tamen, li neniam estis vidinta unu antaŭe, kaj tiu rigardo al la aro da kampoj de Potma frapis lin kvazaŭ vidaĵo rekte el verko de Dostoyevski.

"La teruraj labor-kampoj de Potma", li skribis poste, "kuŝas laŭlonge de la fervojo kvazaŭ 'furunkoj'. La tristego malfacile povus esti troigata. Potma estas timiga loko kiu memorigas tuj pri la naziaj koncentrejoj", li aldonis.

Sed Krimgold vidis nur Potman, veturante laŭ la privata linio KGB el Potma al Baraŝevo, fervoja linio mistere mankanta en la oficialaj mapoj de Sovetunio. Li ne vidis la aliajn "forunkojn". En la Insulo Wrangel en la Arkta Maro, laŭlonge de la stepoj, tra la Uraloj, en Ukrajno, similaj kampoj etendas tra la tuta Sovetunio: en ebenaĵoj kaj en arbaroj, en la lokoj de estontaj urboj, en segejoj, en hidroelektrikaj digoj, en konstruadoj de fervojoj kaj aerhavenoj, en minoj, kaj en similaj projektoj postulantaj pezan laboron. Ekzistas eble 1.000 tiaj labor-kampoj tra la Unio, en kiuj estas sklavigitaj, laŭ multaj ekspertoj, de 5 ĝis 10 milionoj da homoj. Multaj estas politikaj malliberuloj, aŭ anoj de minoritataj grupoj -ne nur judoj, sed de ĉiu malmultana raso aŭ kredo en la soveta imperio.

Kampoj por viroj, kampoj por virinoj, kaj por virinoj kun beboj. Kampoj kie viroj kaj virinoj malsaniĝas, kaj ofte mortas pro maltaŭga manĝado, manko de medicina zorgo, malŝirmo, brutaleco kaj troa laborigo. Kampoj, en almenaŭ unu el kiuj, malliberuloj estas estintaj uzataj kiel kobajoj en danĝeraj medicinaj eksperimentoj.

Krimgold vidis la "forunkojn" en julio de 1971. Reyze Palatnik, alia antaŭnelonga emigrinto al Izraelo, las-

is unu el tiaj kampoj la pasintan decembron. "Ĝi situis en marĉejo", li rakontas. "La konstruaĵoj humidaj ..., la vivo en malvarmo, manko de kuracista servo. Oni devas ŝveni por esti permesata ĉesi labori tiun tagon".

En februaro de 1972, Juri Galanskov, la malkonsentema verkisto kaj intelektulo, skribis al la Ruĝa Kruco kaj al la Unuiĝintaj Nacioj, parte dirante: "La sesa jaro ekkomenciĝis... Mi malsanas... duodenaj ulceroj. (Sufiĉaj) dormo kaj manĝo neataj dum pli ol kvin jaroj nun. Devigata labori ok horojn tage. Ĉiu tago estas torturo. Mia sano malboniĝadas. Mi estas laŭgrade ekstermata. Mi ne povas plu silenti. Ne nur mia sano, sed mia vivo mem, estas nun endanĝerigita".

Naŭ monatojn poste, Galanskov mortis en la labor-kampoj de Potma.

Laŭ Mikhail Shepshelovich (Ŝepŝeloviĉ), alia nova liberigito el labor-kampo, tiaj mortoj ne estas eraroj. "Ekstermo estas efektivigata per malrapida detruproceso tra multaj jaroj", li skribas.

"Daŭra malbonnutrado kaj la konstanta nerva tensio en la etoso de la malliberulo estas la esenco aŭ kerno de tiu metodo. Kuracista zorgo dependas multe de lia sinteno rilate al politiko. Homo, kiu ne rezignas siajn politikajn konvinkojn, praktike ricevas nenian medicinan helpon. En labor-kampoj tiaj homoj estas kondamnitaj al mal-rapidaj malboniĝo kaj morto".

Tiuj asertoj aperas en raporto antaŭnelonge publikigita de la Interna Sekurec-Subkomitato de la Senato, titolita "Labor-kampoj de Sovetunio", konsistanta el 280 paĝoj da deponoj de novaj emigrintoj, subteraj skribaĵoj kaŝe portitaj ekster Sovetunion, kaj el vidatesto de Abraham Ŝifrin, notinda soveta juda intelektulo, advokato kiu pasigis jardekon en 30 laborkampoj, pluajn jarojn kviete kolektante pruvojn en Sovetunio, kaj la pasintajn tri jarojn intervjuante sovetajn judojn alvenantaj en Izraelion.

Laŭ Ŝifrin rakontas, oni arestis lin en 1953 per tromp-akuzo ke li spionadis por Usono kaj Izraelio. Dekomence, oni kondamnis lin al mortpuno, sed liaj akuzantoj mem malaperis dum interna "purgo" de la KGB. Lia puno estis tiam malpliigita al ekzilo en Kazakhstan en 1963. Laborigite kiel advokato, li estis komisiita fojfoje vojaĝi pro registaraj aferoj. Dum tiuj vojaĝoj, li intervjuis

eksmalliberulojn kiuj pretervivis la kondiĉojn de la labor-kampoj, kiam ajn li povis, kaj indikis sur mapojn la lokiĝon de la kampoj mem. Li kalkulas ke en Ruslando funkcias nuntempe ne malpli ol 1.000 labor-kampoj.

En 1970 Ŝifrin estis inter la plej unuaj judoj permesitaj forlasi Izraelien. La plej multaj estis malkonsentemaj problem-farantoj, kiujn la soveta reĝimo tre volonte lasus eliri.

Laŭ Ŝifrin, la kampoj kiujn li vidis estis plenaj de homoj enkarcerigitaj pro siaj ideologiaj aŭ religiaj kredoj. Sed li ankaŭ rakontas pri kvar aŭ kvin ĉukĉioj (rusaj eskimoj) kondamnitaj al 25 jaroj da karcero pro klopodo harpuni sovetan submarŝipon. Ili kredis ke temis pri baleno.

Li memoras viron, kiun oni batadis kaj pridemandadis ĝis kiam li ne plu povis elteni, kiam li finfine konsentis ke li estis spiono. "Por kiu lando?" oni lin demandis. Timante nomi grandan potencon tiel kiel Usono, li kontentigis siajn turmentantojn nomante etan Gvatemalon! Ankaŭ li estis kondamnita je 25 jaroj.

Tamen, pli ofta estas la enkarcerigo de tiuj, kies pensoj estas suspektataj. Arkady Vološin, liberigita la pasintan jaron, estis kondamnita pro disdono de juda preĝlibro, planado de hebreaj studoj, kaj presado de hebreaj lernolibroj.

Ŝifrin asertas ke li vidis multajn terurajojn. Li vidis sam-karceranojn, kiuj mutilis sin pro senespero kaj protesto. Malliberuloj laborantaj en segejoj eĉ eltranĉis manon kaj metis ĝin inter la tabuloj (tranĉitaj aŭ segitaj lignoj) por atentigi la iamajn ricevantojn de la ligno, eble en la Libera Mondo, pri iliaj teruraj kondiĉoj. Ŝifrin vidis aliajn tranĉegi sin, kaj intence infekti siajn vundojn por ĝui la ripozon de hospitala lito. Aliaj proteste fortranĉis siajn orelojn, aŭ tatuis sur siajn fruntojn kontraŭ-reĝimajn sloganojn.

Responde, Ŝifrin vidis la gardistojn reagi per teruriga krueleco. Viro estis punita per surŝprucado de akvo, en temperaturo de -35º C. Li mortis. Alia mortis ligita al stango en regiono kie kuloj svarmis, kaj oni povis vidi lian korpon ŝveliĝi sub la pikoj de la insektoj.

En la nordaj kampoj iu nombro da malliberuloj mortas

ĉiun nokton dumvintre.

Ŝifrin menciis karcerajn "ĉelojn" nur 2'60 x 3 me-trajn, kiuj entenis sep homojn, kun unu kuŝilo aŭ litaĉo. La manĝaĵo estas malmulta kaj malbona, ofte putra. En nordaj kampoj, kie la temperaturoj malleviĝas ĝis -35 aŭ -40º C., malliberuloj iradis labori en improviziitaj ŝuoj faritaj el aŭtomobilaj radringoj. Frostlezoj estis oftegaj. La loĝantaro de kampoj varias de 250 ĝis 10.000 homoj.

La kampoj situas apud grandaj konstruejoj, minoj, segejoj, ktp. Ŝifrin mem laboris je digo konstruata pleje el egaj ŝtonoj trenitaj en iliajn lokojn mane, kiel tiuj de la piramidoj.

Konvinkita ke la mondopinio efikas sur Moskvon, Ŝifrin urĝe petas ke la cetero de la mondo kriu sian naŭzon pri la soveta sklavlabora sistemo de la 1970-oj. "Ni povas helpi du maniere", li diras. "Unue, malkaŝante la faktojn, kaj due, esprimante nian indignon".

BRIAN KELLY

---

# ~ BEN SUC ~

Ĝis antaŭ kelkaj monatoj, Ben Suc, estis prospera vilaĝo, de pli malpli 3.500 enloĝantoj. En Ben Suc la Nacia Liberiga Fronto administris la vilaĝon en perfekta simbiozo kun la loĝantaro. Antaŭ la neebleco detrui Vjetkongon, la usonanoj decidis detrui Ben Suc. Kaj tio estas epizodo de la operacio "Cedar Falls" entreprenita de la usona armeo en Suda Vjetnamio. Iam, matene, okupis la vilaĝon, arestis ĉiujn virojn de 15 ĝis 45 jaraĝaj, translokigis la ceteran loĝantaron -virinoj, gemaljunuloj kaj geinfanoj- en ejon por rifuĝintoj, kaj la vilaĝo estis bombardata ĝis neniigi ĉian eblan spuron ke iam ekzistis vilaĝo nomata Ben Suc.

(El JONATHAN SCHELL: "La detruado de Ben Suc")

•

GEOGRAFIO: Hispanio estas duoninsulo, t. e., terparto ĉirkaŭata de akvo escepte de unu flanko, per kiu ĝi disiĝas de la kontinento.

(El PERICH: "Nacional II")

# * Pasporta Servo

PASPORTA SERVO oficiale ekfunkciis en 1967 kiel Programo "Pasporto" kaj estis nova sistemo por internacia junulara vojaĝado. De tiam la sperto igis modifi la kondiĉojn, ĉar oni trovis malfacilaĵojn por plena senpaga gastigado.

Rubén Feldman González elpensis tiun servon kaj prizorgis la unuajn paŝojn, sed nun estas Jeanne-Marie Cash-Liouville la koncerna respondeculino.

Dank' al ŝi ni povas publikigi la ĉi suban informon.

PASPORTA SERVO estas la gastiga servo de TEJO. Multaj homoj el ĉiuj aĝoj havas loĝejon iomete pli grandan ol sufiĉas por ili, kaj ŝatas ekhavi novajn amikojn kaj helpi al homfratoj. Multaj aliaj homoj -kutime junaj- ŝatas vojaĝi, deziras konatiĝi kun enloĝantoj de vizitataj regionoj, kaj disponas pri malmulta mono. Se tiuj homoj hazarde parolas saman lingvon -ekzemple, esperanton- tre facile povas okazi gastigo kiu kontentigos ambaŭ.

Por faciligi tiajn gastigojn PASPORTA SERVO de TEJO estas reorganizita sur jenaj bazoj:

1. PASPORTA SERVO estas neprofitcela servo disponigita al tiuj, kiuj pagas aliĝkotizon tiucele.
2. Kvankam ĝi funkcias en kadro de TEJO, la servo devas esti finance memstara.
3. La servo publikigas ĉiujare broŝuron kiu enhavas liston de gastigant-adresoj. La broŝuro estas disdonata kontraŭ aliĝpago.
4. La gastigofertoj registritaj laŭ geografia ordo en la broŝuro devas enteni jenajn informojn:
    - kio disponeblas: lito aŭ ĉambro;
    - nomo kaj adresoj kompletaj (kun mencio pri kiom for de la plej proksima granda urbo);
    - maksimuma periodo de gastado;
    - maksimuma nombro de samtempaj gastoj;
    - postulata aĝlimo de gastoj (eventuale);
    - periodo kiam la oferto validas.
5. La gastigpetanto mem ekkontaktas la koncernan personon ĉe kiu li ŝatus gasti kaj faras kun li necesajn interkonsentojn pri la karakterizo de la gastado (daŭro,

komforto, eventualaj repagoj por manĝoj, ktp.).

6. La servo ne povas respondeci pri:
   a) eventuala nekoincido inter la publikigitaj informoj kaj la efektiva plenumo de la gastado,
   b) problemoj okazantaj se la gastigpetanto alvenas sur loke sen antaŭe kontakti la ofertanton, aŭ antaŭ ol ricevi de la ofertanto konfirman respondon pri la gastigo.

Bedaŭrinde, la hispana kunlaborado por pli bona sukceso de PASPORTA SERVO preskaŭ ne estas. Nur UNU hispana gastiganto sin proponis kaj pro persona kontakto de Jeanne-Marie. La limdato jam pais, kaj do tiuj ĉi linioj ne povos atingi pli da gastigantoj, sed almenaŭ ni estus kontentaj se ni atingus konsciigi al vi pri la gravecon kaj utileco kiun ni atingus per plia kunlaborado.

La broŝuro estas havebla kontraŭ aliĝkotizo de 65 pesetoj ĉe: H E J S
Barrencalle Barrena, 7-1º
B I L B A O - 5

## ⟶ ĈU VERO AŬ BLUFO ?

Lastatempe en pluraj nacilingvaj ("El Musical") kaj Esperantaj periodaĵoj ("TEJO Novaĵoj") aperis tiurilate interesa kaj ofte kontraŭdira "novaĵo" pri la fama muzikensemblo "The Beatles", kiu ja dum pluraj jaroj ne plu ekzistas. Tamen, laŭ la pariza semajna gazeto "L'Express" (kiu ŝajne lanĉis la "novaĵon") la fama brita ensemblo reaperos sur koncerta podio en Montrealo, la 1-an de julio 1974, por subteni "la sporton kaj la internacian lingvon Esperanto". Kvankam la koncerto estos senpaga por la publiko, la ensemblo esperas enkasigi dek milionojn da dolaroj, el kio oni planas subvencii per mil dolaroj ĉiun unuopan sportiston dum la Olimpikoj, kaj per du mil dolaroj ĉiun sportiston, kiu deklaros sian pretecon lerni la Internacian Lingvon. La fonto de tiuj enspezoj devus esti la aŭtoraj rajtoj por filmo, televido, diskoj kaj sonbendoj.

(El "TEJO Novaĵoj")

# NOVAJ ENERGIAJ RIMEDOJ

Kun la celo pritrakti en nia revuo temojn pli interesajn al vi, ni komencas serion de artikoloj pri aktualaj temoj kiujn ni opinias allogaj por vi, kaj por kiuj ni petis en la antaŭa numero vian ne - alvenintan kunlaboron. Ĉi tiuj artikoloj ne celas - esti lernolibraj paĝoj, sed,pli bone, kvazaŭ ĵurnalaj novaĵoj.

Je la komenco, ekestis dilemo, kiun temon ni - elektu por la venonta numero?. Sendube, nur malfer-minte ĵurnalon ja ni trovas multajn temojn elekte - blajn pro ilia intereso, kaj tiel, pensante pri unu kaj la alia, ni decidis diskuti tiun ĉi tiel modan kaj priokupigantan : Ĉu ni havas sufiĉe da energio por la nuno kaj la estonteco ?. Ĉu ne necesas dis - volvi la esploradon ĝis la plej alta grado por tro-vi novajn energiajn rimedojn ?.

La energio liberigis la homaron de la fortlabo ra sklaveco. La energia manko ne nur revenigus tiun sklavecon, sed ankaŭ malhavigus al ĝi la necesajn - ekonomiajn kondiĉojn por la subteno de la nuna vi - vantaro.

La energio estas la motoro de la materia evoluo de la popolo. Ĝis proksimume antaŭ 20 jaroj la ener-giaj rimedoj temis pri energio amasigita en la flu-ejoj de la riveroj aŭ tiu de la brulaĵoj: karbo,pe-trolo, gaso.......

Dum la lastaj 20 jaroj ni travivis facilenergian epokon, surbaze de la ekspluatado de abunda kaj mal kara petrolo, kiu, samtempa al la grandaj teknologiaj antaŭenpaŝoj, estigis evoluan kaj prosperan fazon ne niam antaŭe konita en la homara historio.

Sed, ĉu la esplorado por produkti energion bazi ĝis nur sur la petrolo?. Ne, sendube la esplorantoj ne konformiĝis kaj klopodis serĉi novajn energiajn - solvojn. Ni mallonge klarigu kelkajn :

—Energio produktata de la tajda movo. Je la fluso, la akvo plenigas basenon, kaj je la malfluso tiu realmariĝanta akvo trapaŝas turbinon. Oni faris provojn en norda Francujo kaj kelkaj partoj de Sovetunio.

—Energio produktata de ventaj muelilo j (ĝis nun uzitaj nur por meĥanika energio).

—Sunradia energio (nur malgrandkvante profitata. Oni atingis varmigi domon, malgrandan uzinon).

—Fine ni menciu la atomkernan energion, kiu pli bonan rezulton povos doni al ni. La atomkerna esplorado komenciĝis en 1905ª j. . Kiam Einstein konigis la ekvivalenton inter maso kaj energio. Je la fino de la 1938ª oni ekkonis la eblecon de la atomkerna disiĝo. En la 1942ª j. okazis la unua elmontro en atoma reaktoro. En la 1945ª j. la 6ªn de aŭgusto, tuta urbo malaperis: Hiroŝima. Post finiĝo de la 2ª mondmilito, la sciencaj antaŭenpaŝoj ebligis disvolvadon de teknologio por la atomkerna uzado en pacaj uzoj, profitante la hejton kreitan de la atomkerna disiĝo por atingi vaporon movigantan la turbinojn produktantajn elektron.

En la 1954ª j. UN kunvokis konferencon en Genevo. Tie oni interŝanĝis grandan kvanton da kono pri la atomkernaj esploroj, sed ne ĉiuj landoj sciigis ĉion konatan de si. Sed la publiko je monda nivelo eklasis flugi sian imagon, pri la komforton kaj avantaĝoj kiujn ĝi povus ĝui el la uzado de atoma energio.

La ekspluatado de energio duobliĝas en Hispanujo ĉiun sepan jaron, kio priokupigis la registaron kaj industrion. Ekzistas sufiĉe ambicia projekto. Nuntempe, tri atomaj centraloj, kun suma potenco de 1.120.000 Kv. funkcias en nia lando.

JOSE MIGUEL?

( daŭrigota )

./..

# EN LA PROFUNDAĴOJ DE LA TERO

Malsuprenirante, malsuprenirante, malrapide ĝis la plej granda terprofundaĵo, kie apenaŭ estas vivo, kie la silento estas la murmuro de ĝia propa naturo, kien ne alvenas la lumo nek la vento, nur la tenebroj kaj la mallumeco regas tie kie neniu ilin malhelpas.

Tie, en la nekonata kaj preskaŭ enigma loko,tie kie la gutoj de la pluvo filtriĝas kaj glitas unuj sur aliaj, milde kaj malrapide, lasante post sia paso post signojn negravajn tamen post miloj kaj miloj da jaroj ili postlasis konstantan, firman, stalaktiton kaj stalagmiton, kiuj pendas aŭ staras inter rokoj aŭ etaĝoj trafluebIaj, similante fantaziajn alimondajn spektrojn per miloj kaj miloj da malsimilaj aspektoj, kaj kun - granda amplekso da koloroj; ruĝaspektaj kaj blankaspektaj, malsekaj kaj glitaj.

Jen la homo, la speleologo, kiu rompas la trankvilecon de tiu mortsilenta mondo, preta por lukti kontraŭ iu ajn malfavora cirkonstanco, portante sur sia frunto la lumon de la karburilo, estigante malgrandan kaj artefaritan sunleviĝon.

Lia firmeco kaj scivolemo pretigas por li grandajn surprizojn. Li instalas la ŝnurŝtuparon tute konscie kaj poste dum li malsupreniras, aliaj asekuras lin kaj atentas aŭdi lian voĉon ordonante, antaŭen !.

Ili intencas malsupreniri malrapide, sed sekure kun la interna emocio gasti dum kelkaj horoj ĉe la imponaj profundaĵoj de la tero.


Sed la speleologo ne nur konformiĝas koni la - profundaĵojn, li ankaŭ esploras la diversajn tipojn de rokoj, ilian strukturon, iliajn mezurojn, iliajn volumojn, ankaŭ la eblajn vivoformojn ekzistantaj en tiuj profundaĵoj; tie estas la ebla biologia aktiveco kaj la arĥeologia eble ekzistanta en tiu ĉi loko, tiom kaŝita kaj nekonata, kiu permesante ĝian malkovron pli-

grandigas ĝian valoron.

Kaj kiam la iloj ne permesas iri pli profun den, tiam la speleologo adiaŭas, sed pli bone ĝisrevidas ĉar li revenas, tute certe, kaj ne forlasos eĉ la plej kaŝitan angulon sen esploro.

Malrapide kaj kun pli da ĝojo ol je la malsuprenirado ni ekkomencas la supreniradon, malrapida - kiel longa adiaŭo, longa, sed ne dezirante vidi la tag lumon, kiun preskaŭ ni forgesis. Tiam aperas en ĉiuj - vizaĝoj la ekridoj pri la atingita malfacilo.

## distraPAĜO



El "Anaitasuna"



El "La Voz de España"

# VIª FRANCA-HISPANA RENKONTIĜO

Unue, ni devas humile peti al vi pardonon pro nia forgeso anonci tiun-ĉi eventon en la antaŭaj numeroj de nia bulteno. Ĝi estis tiel konata de ni, la Bilbao'anoj, ke ni ne rimarkis ke eble aliaj povus ne scii pri la afero.

Nun, ni rakontu. Oni povus diri ke ne temis pri Franca-Hispana Renkontiĝo, sed pri nordhispana renkontiĝo kiun ĉeestis ankaŭ kelkaj francoj kaj alilandanoj. Tiel estis, ĉar ĝin partoprenis 44 Bilbao'anoj, 21 zaragozanoj, 3 santanderanoj kaj el Esperantujo venis 9 francoj 2 aŭstroj kaj 2 svedoj. Per tio vi povas supozi kiu estis la lingvo aŭskultata dum la aranĝo. Mi povas konstati ke ne nur estis la hispana (kompreneble) sed ankaŭ la franca kaj aŭstra (pri la sveda mi ne scias). Kelkfoje, eĉ Esperanto estis uzata.

Pri la programo, nenia plendo. Ĉio bone aranĝita, pasigis al ni feliĉajn tagojn. El ĝi, rimarkinda programero estas la akcepto de la renkontiĝanoj en la Urbodomo de Biarritz fare de la urbestro-deputito Sro. Guy Petit, persono tre influhava en nia najbara lando, kiu salutis nin kun vortoj tre favoraj al nia movado. La 4ªn. vespere, la programo estis folklora; ni povis ĉeesti specialan pilkludan spektaklon, kaj post la vespermanĝo, vaskaj kantoj kaj dancoj ĝojigis nin kaj konigis nian tradicion al la alilandanoj. Je la fino, ni ĉiuj kune kantis vaskan kanzonon konata en ambaŭ flankoj de la landlimo. Dimanĉe matene, la vizito al la Muzeo de la maro estis tre interesa. La bankedo, lasta programero, finis per ora punkto la 6ªn. Francan-Hispanan Renkontiĝon.

Sed tio vere priparolinda estis la esperanta etoso, ĉar, malgraŭ ĉio antaŭe dirita, ĝi ekzistis. Oni povis forlasi la krokodilantajn samlandanojn kaj mergi sin inter eksterlandaj gesamideanoj, kaj sperti la taŭgecon de nia lingvo paroli kun homoj kies lingvo estas nekonata al ni, kaj per tio starigi fratan amikecon. Se vi ankoraŭ ne spertis tion, mi varme konsilas al vi; ne diru ke vi ne kapablas interparoli esperante; eĉ Bilbaoáj gelernantoj, ĵus finintaj kurson povis malgraŭ sia timo, libere paroli kun francaj gesamideanoj. Do, ne timu!. La venontjara Renkontiĝo tre eble okazos en Huesca, kie nun ekfloras nia movado. Ĉu vi iros?. Mi certe jes.

ASIER